

Eŭropa Bulteno

Januaro 2018, Numero 177

MULTLINGVA AKCELILO – UNUA RENKONTIĜO EN ZAGREBO



La unua renkontiĝo de la 9 partneraj organizaĵoj kiu prilaboras la EU-projekton Lingva Akcelilo okazis en Zagrebo de la 10-a ĝis la 11-a de januaro 2018. Temas pri aparte grava projekto, kiel mi sube provos klarigi.

Multlingva Akcelilo estas dujara projekto aprobita fare de EU por plibonigi kaj plirapidigi lingvolernadon ĝenerale. Tiucele ĝi uzas materialon ellaboritan por la Zagreba Metodo por lerni Esperanton. La celo de Multlingva Akcelilo estas prepari instruimaterialojn por plej rapide paroligi la lernantojn. Tiel ĝi uzas severe limigitan kvanton da materialo, kaj forigas ĉiun balaston kiu povus malrapidigi la lernadon.

Sciencaj esploroj de Zlatko Tišljar pri 60.000 surbendigitaj vortoj de parolata Esperanto en 1979 montris ke oni povas kompreni 95% de konversacia Esperanto se oni ellernas nur la plej ofte uzatajn 467 morfemojn. Zlatko diplomiĝis ĉe la Universitato de Zagrebo per la

prilaborado de tiu materialo por produkti novan lernokurson de Esperanto, kun aliaj kroataj spertuloj pri lingvolernado.

Multlingva Akcelilo nun elektis la 242 plej oftajn morfemojn el tiu morfemaro, por esti lernataj fare de bazlernejaj infanoj en lernejoj en Kroatio, Slovenio, Slovakio kaj Bulgario. La januaran kunsidon ĉeestis instruistinoj el tri landoj, kaj aliaj kunlaborantoj el Germanio, Slovakio, Danio kaj Irlando. La plimulto de la instruistinoj ne parolas Esperanton, sed ili konsentis kunlabori por eltrovi didaktikan aliron al lingvolernado bazita je la Zagreba Metodo por lerni Esperanton. Okazis tre detala diskuto pri la laborprogramo por la venontaj du jaroj. La partopreno de ne-esperantistoj en la projekto, kvankam ĝi iom komplikas la komunikadon, povos helpi eltrovi aliron al lingvolernado kiun povos uzi eĉ instruistoj kiuj ne parolas Esperanton.

Kelkaj ecoj de la strukturo de Esperanto igas ĝin aparte taŭga por la plirapidigo de lingvolernado ĝenerale. Ni menciuj la fakton ke la morfemoj de Esperanto estas neŝangeblaj kaj libere kombineblaj, kaj ankaŭ la fakto ke tiuj morfemoj uzeblas kiel sendependaj vortoj, kiel en la ĉina lingvo. Neniu hindeŭropa lingvo havas tiujn trajtojn, kaj aparte gravas ke lingvoinstruistoj tra la EU-landaro eksciuj tion.

Lingvolernado en EU estas en krizo: ekde la Eŭropa Konsilio de Barcelono de 2002 la oficiala celo de EU estas ke ĉiu EU-civitano lernu almenaŭ tri lingvojn – la denaskan kaj du aliajn. Pli kaj pli klaras ke la dominado de la angla en instrusistemoj rekte malhelpas la EU-celon, ĉar ĝi prenas troan lernotempon kaj samtempe malpliigas la motivadon lerni trian lingvon. **Surveylang**, organizita fare de la Eŭropa Komisiono en 2012, science montris tiun fakton, kaj la mankon de sukcesa lingvolernado. Ekzemple, Surveylang eĉ ne ekzamenis homojn je la 2 superaj niveloj, C1 kaj C2. Mi demandis kial, kaj la respondo estis “ĉar la kvanto da lernantoj kiuj atingis la C1-nivelon en la unua fremdlingvo – ni lasu sen mencio la pli superan C2-nivelon – estas statistike nesignifa, proksimume 1%”. La tiel-nomataj “ekspertoj de lingvolernado” kiuj ne konas Esperanton, neniel povos plibonigi la situacion. Do, endas Multlingva Akcelilo!

D-ro Seán Ó Riain

KOMENCIĜIS DUJARA EŬROPA PROJEKTO „MULTLINGVA AKCELILO“



Co-funded by the
Erasmus+ Programme
of the European Union

La projekton financas Eŭropa Komisiono pere de sia programo Erasmus+. La projekton gvidas Zagreba eldonejo IZVORI (Fontoj) kaj en Zagrebo kunpartneras ankaŭ la elementa lernejo el Retkovec. Entute en la projekto kunaktivis pliaj 7 partneroj, tri el Slovenio kaj po unu el Slovakio, Germanio, Danio kaj Bulgario. Inter ili estas du universitatoj kaj 3 elementaj lernejoj.

La projekto formale startis komence de novembro 2017 kaj devas finiĝi fine de decembro 2019. La realan starton efektive prezentis la unua renkontiĝo de po du reprezentantoj de ĉiuj partneroj kiu okazis de la 10-a ĝis la 11-a de januaro 2018 en Zagreba hotelo Palace. Ĉeestis 18 reprezentantoj de ĉiuj partneroj.



La projekto devas produkti lernprogramon por nova volontula lernobjekto por triaklasanoj de bazaj eŭropaj lernejoj (antaŭ enkonduko de dua fremdlingvo – ĉar la unuan fremdlingvon nuntempe, kutime la anglan, oni enkondukas plej ofte jam en la unua klaso. Per tiu ĉi lernobjekto oni grave plirapidigas la lernadon de dua kaj postaj lingvoj (25-30%). Oni produktos didaktikajn rimedojn por Multlingva akcelilo kiuj uzos maksimume modernan

informatikan teknologion. La bazo estos portalo por instruistoj kaj gelernantoj. Kompletan novaĵon prezentos ellaboro de generilo de demandaj frazoj kiujn kreos komputilprogramo kaj ĉiutage demandas la gelernantojn per demandoj konsistantaj nur el vort- kaj gramatik-elementoj lernitaj ĝis tiu momento.

Tiel krom la du lernohoroj en la lernejo semajne la gelernantoj lernos interaktive ĉiutage ricevante dekon da demandoj al kiuj ili devos skribi respondi. Ili tiel ekzercos la lernitaĵojn por ne forgesi ilin kaj praktikos la lingvon ĉiutage. La plimulto de la ekzercoj estos ligitaj al la portalo kaj la gelernantoj devos uzi kaj en la lernejo kaj hejme komputilon aŭ tabletkomputileton.

La dua parto de la projekto estos elprovado de tiu didaktika materialo dum 2-monata kurseto kiujn en 4 bazaj lernejoj gvidos tieaj fremdlingvo-instruistoj kiuj mem paralele kun la gelernantoj lernos Multlingvan akcelilon. La esenco de tiu enkonduka lernobjekto kiu pli poste akcelos grave la lernadon de dua kaj 3-a fremdlingvo, sed ankaŭ la komprenon de la propra gepatra lingvo estos parteto de Esperanto kiu estas plej logike gramatike strukturita lingvo. Antaŭe faritaj eksperimentoj pri tiel nomata propedeŭtika rolo de Esperanto montris ke 240 plej oftaj morfemoj de Esperanto kovras 80% de praktika parola lingvo kaj tio estas plej oftaj leksikaj kaj gramatikaj morfemoj de Esperanto. El ili eblas produkti milojn de uzeblaj kaj tuj praktikataj E-vortoj en ĉiutaga lingvo. Baze de la plej oftaj 500 morfemoj estis farita baza lernolibro de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo kies unuan duonon oni ankaŭ uzas en la projekto.

Kaj la lasta nekutima celo de la projekto estas ke la Lingvan Akcelilon animacie gvidos instruistoj kiuj ne konas Esperanton, sed faras tion nur baze de instrukcioj en la portalo kaj tiel ne necesos krei apartan instruistaron. La elementa didaktika materialo kaj la du unuaj instrumonatoj okazos jam antaŭ la fino de la lernojaro 2017/2018 do antaŭ la someraj ferioj kaj la partneroj okazigos en septembro la duan partnerrenkontiĝon en Bratislavo kie oni diskutos la spertojn de tiu fazo de la proekto. Post tio la partneroj ellaboros definitivan didaktikan materialon por la tuta unujara lernobjekto el 64 lernohoroj.

Zlatko Tišljarić

NOVA ENCIKLOPLEDIO: NIA DILIGENTA KOLEGARO



Komence de februaro en Kaŭno (Litovio) estos presita nova enciklopedio pri 200 eminentaj esperantistoj, kiun kuneldonas la Ruslanda eldonejo *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio: Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander. *Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj.* — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2018. — 320 p., il.; 500 ekz. — (Serio *Scio*, №10).

Redakta komitato: Vilmos Benczik, Detlev Blanke (†), Roman Dobrzyński, Li Chaoyang, Ulrich Lins, Miroslav Malovec, Carlo Minnaja, Anatolij Sidorov, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljarić

Verkis: Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

Redaktis kaj enpaĝigis: Aleksander Korĵenkov

Korektis: Halina Gorecka

Provlegis: Paweł Fischer-Kotowski, Carlo Minnaja, José Antonio Vergara

La kovrilon kreis: Karolis Zovė

Nia diligenta kolegaro estas la 120a libro kuneldonita de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. La aŭtoroj dankas al Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) pro subvencio, kiu ebligis prepari ĉi tiun libron. Nia diligenta kolegaro meze de februaro estos aĉetebla en la libroservo de UEA kaj en aliaj grandaj Esperantaj libroservoj kontraŭ 30 eŭroj (plus sendokosto).

Specimenaj paĝoj: La komencaj paĝoj (165-171) de la litero “L” estas libere elŝuteblaj kiel dosiero [Ndk-l.pdf](#). Ili entenas la NDK-artikolojn pri Valdemar Langlet, Eŭgeno Lanti kaj Ivo Lapenna. Tri artikoloj el NDK aperis en *La Ondo de Esperanto* (en iomete adaptita porgazeta formo); ili estas legeblaj en la novaĵretejo *La Balta Ondo*:

Teo Jung <http://sezonoj.ru/2017/12/jung/>

Ralph Harry <http://sezonoj.ru/2017/10/harry/>

Émile Boirac <http://sezonoj.ru/2017/09/boirac/>

Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

VIZITREKORDO ĈE LA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO



La Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko pasintjare havis pli ol 20.000 vizitantojn. Tio estas rekordo por la muzeo, kiu estis fondita antaŭ 90 jaroj, rakontas la estro de la muzeo, Bernhard Tuidler. La Esperanto-muzeo situas en la centro de Vieno, unu el la plej grandaj urboj en Eŭropo. Tial ĝi estas rimarkata de multaj personoj kaj ankaŭ estas tre grava pordo al la publiko. Dum la pasintaj jaroj la nombro de vizitantoj daŭre kreskis.



En 2017 rekorda nombro da 21.256 personoj vizitis la Esperanto-muzeon, kompare kun la jaro 2016 (15.937) tio estas rimarkinda plialtiĝo de 33 %, kompare kun la jaro 2006 (5.025) eĉ 323 %. Inter la vizitantoj estas ne nur personoj el Vieno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, precipe gelemnantoj kaj gestudentoj, sed ankaŭ multaj turistoj. Same daŭre venas esperantistoj el diversaj partoj de la mondo en la Esperanto-muzeon, kiu – fondita en 1927 – konservas kaj disponigas mondscale la plej ampleksan kolekton pri Esperanto kaj planlingvoj.



Tiu ege pozitiva evoluo baziĝas precipe sur la pliampleksigo de la deĵorhoroj, la enkonduko de novaj laŭaĝaj atelieroj kaj sur eventoj kun specialaj laŭtemaj gvidadoj. Tiel ĉiujare inter 40 kaj 50 grupoj ricevas dum 30, 60 aŭ 90 minutoj bazajn konojn pri Esperanto, ili povas efektuple sperti, ke la lingvo bone funkcias, kaj ili ankaŭ ekscias, ke ĝi estas ĉiutage uzata en nia instituto – de dungitoj kaj de vizitantaj esperantistoj. Krome vizitantoj povas percepti, ke la Esperanto-muzeo estas ne nur muzeo, sed – ekde sia fondo en 1927 – ankaŭ biblioteko kaj arkivo, kiu nuntempe konservas kaj disponigas jenan havaĵon:

- 40.000 faldfolioj
- 35.000 volumoj
- 25.000 gazeteltondaĵoj, precipe el la tempo 1900–1920
- 22.000 fotoj kaj fotonegativoj
- 10.000 manuskriptoj kaj aŭtografoj
- 3.700 diversaj periodaĵoj

3.000 muzeaj objektoj
 1.500 afiŝoj
 850 aŭd-vidaj materialoj
 56 antaŭlasaĵoj, postlasaĵoj kaj arkivoj (de asocioj, eldonejoj kaj revuoj)

Se oni konsideras, ke la Esperanto-muzeo disponas pri ekspozicia spaco de nur 80 kvadratmetroj, la statistiko estas elstara: ekde 2005, kiam la nova ekspozicio en Herrengasse 9 estis inaŭgurita, vizitis ĝin pli ol 130.000 personoj, okazis preskaŭ 700 gvidadoj kaj pli ol 350 Esperanto-fulmkursoj (regule nur ekde la jaro 2009), kiujn partoprenis entute pli ol 8.000 personoj. Pli da informoj troveblas en la retejo de la [Kolekto por planlingvoj](#) kaj en la [retejo de la Esperanto-muzeo](#).

Bernhard Tuidler

POEZIO TUTLIBERA

La fama internacia konkurso por junuloj « Poésie en liberté » (Poezio tut'libera) ekzistas jam de 20 jaroj en la franca. En 2018, unuafoje, Esperanto-France sukcesis, ke oni povus ankaŭ verki poemojn *esperante*. Do ni nepre devos respondi al tiu invito! Rajtas partopreni junuloj aĝaj de 15 ĝis 25 jaroj, el ĉiuj landoj. La partopreno konsistas en sendo de neeldonita poemo, versa aŭ proza, kun maksimume 30 versoj aŭ 30 linioj. La kandidatoj rajtas sendi po unu poemon en la franca aŭ en la Esperanta, sed eblas sendi po unu en ĉiuj el tiuj lingvoj.

La partopreno okazas nur rete ekde la 1-a de januaro ĝis la 7-a de aprilo 2018 uzante la formularon publikigitan ĉe www.poesie-en-liberte.fr. La ĵurio elektos la gajnantojn fine de majo.



La ĵurio elektos la gajnantojn fine de majo. En novembro 2018, tiuj estos invitataj dum 3 tagoj viziti Parizon, loĝante ĉe esperantaj familioj, kaj partoprenos grandan finan ceremonion. Samtempe, la poemoj estos eldonitaj en libro. Kontaktoj aŭ demandoj : gilles.tabard@gmail.com / www.poesie-en-liberte.fr Partoprenis ĉirkaŭ 4000 junuloj el 20 landoj.

Gilles Tabard

IRANO MALPERMESAS LA ANGLAN EN ELEMENTAJ LERNEJOJ

Irano malpermesis la instruadon de la angla en elementaj lernejoj, diris altlerneja oficisto post kiam islamaj gvidantoj avertis, ke frua lernado de la lingvo malfermis la vojon al okcidenta "kultura invado".

"Instruado de la angla en registaraj kaj neregistaraj elementaj lernejoj en la oficiala instruplano kontraŭstaras leĝojn kaj regularojn", diris Mehdi Navid-Adham, estro de la ŝtata altlerneja konsilio, dum la ŝtat-televida elsendo sabaton.

La instruado de la angla kutime komenciĝas en meza lernejo en Irano, al ĉirkaŭ 12-14-jaraj infanoj, sed kelkaj elementaj lernejoj, en tiu aĝo, ankaŭ havas anglajn klasojn.

Kelkaj infanoj ankaŭ frekventas privatajn instituciojn post sia regula lerneja tago. Kaj multaj infanoj de pli privilegiitaj familioj ĉeestas en neregistaraj lernejoj kaj ricevas anglan instruadon pri kuracado.

La islamaj gvidantoj de Irano ofte avertis pri "kultura invado", kaj la plej supera gvidanto Ayatollah Ali Khamenei esprimis indignon en 2016 pro la instruado de la angla disvastiĝinta al infanejoj.

Ayatolah Khamenei diris en tiu parolado al instruistoj: "Tio ne signifas kontraŭadon al la lernado de fremda lingvo, sed estas kontraŭado al promocio de fremda kulturo en nia lando inter infanoj, junaj plenkreskuloj kaj junuloj."

Reuters

ESPERANTO EN DOMO DE LA EUROPA HISTORIO

Dum gvidado de katalunaj esperantistoj kiuj post partopreno al manifestacio volis ankaŭ viziti la urbon Bruselo, ni kune interalie vizitis portempan ekspozicion en la Domo de eŭropa historio. Inter 2015-2016 la belga dramaturgo Thomas Bellinck organizis la vojaĝantan ekspozicion "Domo de eŭropa historio en ekzilo" (kun uzo de Esperanto kiel ĉefa lingvo) tra diversaj eŭropaj urboj en kiu li priskribis imagitan estontecon por la Eŭropa Unio disfaliĝonta ĉirkaŭ la jaro 2018 sekve de financa krizo kaj de kreskantaj naciismaj sentoj. En 2017 la portempa ekspozicio en la Domo de la eŭropa historio estas alia mirinda ekspozicio en Bruselo kie ĉi foje videblis grandformata afiŝo en Esperanto el la jaro 1936, eldonita fare de la iama registaro de Katalunio. Tio pravas ke nia movado havis socian influon tiutempe kaj ke ni eĉ nuntempe meritas atenton en la historio kaj heredaĵo de Eŭropo.

La Domo de la Eŭropa Historio volas kiel kultura institucio kaj muzeo uzi ĉiujn haveblajn rimedojn por promocii pli bonan komprenon de la eŭropa historio kaj al la eŭropa integriĝo el transnacia vidpunkto, prikonsiderante la diversecon kaj multajn interpretaĵojn ĉi-rilate.

-Multlingva domofasado. La muzeo kiu malfermiĝis por la publiko la 6-an de majo 2017, estas iniciato de la Eŭropa Parlamento. Tiucele ĝi interalie organizas plentempan sed ankaŭ portempan kaj vojaĝantan ekspozicion, montrante kolekton de objektoj kaj dokumentoj por

ilustri la eŭropan historion. Krom edukaj programoj okazas kulturaj eventoj kaj eldoniĝas publikaĵoj, sed ankaŭ prezentiĝas riĉa reta enhavo. La muzeo okupas grandan, pluretaĝan palacon en parko proksima al la EU-parlamento en Bruselo. Pere de interagaj ludoj ĝi altiras infanojn kaj plenkreskulojn.

Diverseco kaj eŭropa identeco

La plimulton de la vidindaĵoj oni ofertas en almenaŭ ĉiuj EU-landoj, ĉar la Eŭropa Unio vidas multlingvecon kiel esprimo de la kultura diverseco en Eŭropo kaj por ke la vizitantoj spertu la multlingvan oferton kiel unu el la ĉefaj avantaĝoj de la institucio.

Sciindas ankaŭ ke la kreado de la muzeo iras manenmane kun instigoj de Germanio kaj Francio por krei komunan "eŭropan historio-libron", uzeblan en ĉiuj lernejoj de la EU por akceli komunan kulturen identecon. Kvankam la portempa ekspozicio "Interactions", kiu temas pri la renkontiĝoj kaj kulturaj interŝanĝoj kiuj formis la historion de Eŭropo, apenaŭ vekas la konscion de la vizitantoj pri la lingva diverseco, tamen Esperanto ĉeestas ĝuste tie.

Esperanto en la Domo de la Eŭropa Historio

Esperanto ĉeestas en la formo de granda afiŝo sur vando dediĉita al la civila milito en Hispanio (1936-39) : grandigo de la originalo, kun bunta alvoko al subteno eleksterlande por la respubliko kaj specife celas la geesperantistojn. Naivulo forirus kun la impresoj ke Esperanton inventis ne judo en la cara imperio, sed rezistantaj hispanaj respublikanoj. Neinformitaj personoj povintus konvinkiĝi ke la esperantistaro situis nur ĉe unu flanko, dum nia ĉefa viktimo dum tiu milito estis katolika pastro, murdita de komunistoj. La muzeo invitas pripreni Eŭropon, sed se Eŭropa Unio volas reakiri elanon, necesas ankaŭ nova kultura fazo por la eŭropismo kaj en tio Esperanto povus trovi novan rolon. Fotoj kaj red. Herman Deceuninck Fontoj kaj pliaj informoj : Vikipedio (Domo de la Eŭropa Historio).

Herman Deceuninck

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de januaro 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Seán Ó Riain, Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. Bernhard Tuidar, Herman Deceuninck, Gilles Tabard, Reuters

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

